SEPTEMBRO 1957 N-RO: 4

La Objektivo

Organo de Asocio por
Universala, Racia kaj Objektiva Homkulturo
S. A. T. en Sudameriko

Administrado kaj Redaktado:
G. Ledon - rua B. Martins, 371
PELOTAS - R. G. S. - Brazilio

Materialismo...Spiritualismo

Nia Malsana Mondo:

Ĉiuj Homoj en la mondo akordiĝas por diri, konstati kaj bedaŭri, ke ni vivas en granda ĥaosa periodo. Multnombraj, sed tamen klaraj, estas la motivoj de tiu tutmonda malekvilibro. Bedaŭrinde, en la popola, ĉiutaga vivo, labirinte konstruita, tiu fonto de ĝenerala neŭrozo ne tuj aperas, la mondsituacio aspektas ege komplika: Iamaj fidantoj, en komunismo aŭ alia reĝimo elreviĝis, sinceraj pacamantoj seniluziiĝis, sciencadmirantoj naŭziĝis; junuloj senorientigitaj dubas, hezitas, ktp. Resume, vera malsano, psikozo kreskas en la homaro: kien ni iras... kio okazos! Ĉu plu valoras vivi, ĉu nia terglobo morgaŭ ne eksplodos, ĉu ni ne malaperos?

Tiel ĉiuj konoj malcertiĝas, dubiĝas en la homaj mensoj. Oni ne plu scias, kie estas la vivlimoj, kiu estas la homa rolo, oni ignoras morgaŭan destinon, kaj aŭtomate, nekonscie, en la fundo de ĉiu neŭroza menso leviĝas la plendoĝemo: "Dio savu min!"

Vortoj kiel Dio, Spirito, akiras senliman signifon kaj sinonimas al feliĉo, savo, vero, mondorganizo, moralo, leĝo, ktp. Tio estas fakto kiun ni devas konstati, la nomita spiritualismo rekreskas, kreskegas. La maljunaj batalantoj de la lasta jarcento kaj de la komenco de tiuĉi tion devas scii; iam oni konsideris la eklezion kiel mortan, ekregis laikeco, kaj nun ree temas nur pri pastroj papoj, dioj kaj kristanaĵoj prezentitaj sub mil formoj plej diversaj... Eĉ tiuj famaj materialistoj-marksistoj vokas Dion. Tiel, ĉu en la jarkomenco la fama Kruĉov ne diskursis: "Stalin havis mankojn, sed mi deziras, ke Dio kelpu ĉiun komuniston en lukto kaj en defendo de la laboristaraj interesoj, tiel kiel tion faris Stalin" Bela materialismo ĉu ne? Kiu cetere reinstalas la stalinan ruĝan teroron, eĉ en nomo de dio!

Estas do fakto, Dio regas la mondon, tial ni havas la ĥaoson, la atombombojn ks. Verdire, tiuj kiuj sin nomas: spiritualistoj, dikredantoj, kristanoj kaj aliaj, refutas ĝuste la malon: "La nunan mondĥaoson okazigas la materialismo." Tial decas ke ni konsideru tion kio estas materialismo kaj spiritualismo en ĝiaj realaj manifestoj.

Materialismo:

Ni avertu tuj por forigi bedaŭrindan antaŭjuĝon, ke materialismo ne estas sinonimo de egoismo, avido, ĝuo. Materialismo, NE estas tiu kiu, sciante ke la vivo estas mallonga, profitas ĝin per drinkado, festenado, ekspluatado de sia homfrato, tuttagaj koitadoj kaj diboĉadoj. Ni diru interparenteze, ke sincera materialisto, kiu tiel agus estas malfacile renkontebla, dume tiaj materialistoj, ve, abundegas ĉe la spiritualistoj.

La klasikaj filozofioj difinas materialismon, kiel doktrino laŭ kiu ekzistus nur materio en la universo; ĝi estus la kontraŭo de spiritualismo, ĉar ĝi asertas, ke la spirito estas nura materia fenomeno. Ŝajnas ke materialismo, en nia nuna epoko, ne devas esti konsiderata kiel filozofia doktrino. Ŝajnas ke post la evoluo de la marksisma kaj aliaj spertoj bazitaj en filozofiaj spekulativoj kaj dialektikoj, materialismo iras al pli granda kaj realisma individualismo.

Parolante pli simple: MATERIALISMO ESTAS HOMKONFORMA PROCESO DE SCIENCA ESPLORO PORHOMA. Tiu proceso de esploro iras do, de la homo kiel fundamenta bazo, al la homo kiel celo, tra la eksteraj fenomenoj ĉirkaŭantaj la homon. Ĉiuj fenomenoj estas evidente sentataj kaj kaptataj de la homaj sentumoj. Ĉar la sentumoj, kaptas, konas nur materiaĵojn, ĉio ne materia, aŭ pli ĝuste, ne normale perceptebla de ĉiu kaj ĉiuj normalaj individuoj, ne povas, ne devas esti konsiderata kiel konfonto. Filozofie, dogme eĉ, ni povas diri ke la materio, iel ajn estu ĝia formo, estas la nura elemento, kies manifestojn oni povas esplori. Tio ne signifas, ke materialismo dekretas ke ĝi ĉion esploras, ĉion konas aŭ povas

koni! Ĝi ankaŭ ne asertas, ke sia kono estas absoluta, ĝi perfekte scias ke estas kono nur relativa, sed relativa al la homo, ne al fantazio de la homo.

Logike la tuta proceso estas racie kondukita. Tio signifas, ke per la menso, (povo konsiderata kiel spirita ĉe la spiritualistoj) la homo kunrilatas fenomenojn, kreas artifikojn kiel esploriloj kaj laboriloj, deduktas leĝojn fizikajn ktp, sed la kono restas ligita, unue al la sentuma eksperimentado, kaj due al la konsekvenca spertado.

Ĉar materialismo estas proceso de porhoma esploro, evidentas ke ĝi celas ĉiam pli kaj pli grandan perfektecon individuan, ĉiam pli kaj pli agrablan vivon kun kreskanta komforto, per minimuma peno. Ĝi celas do la plej altgradan individuan liberon, kaj, konsekvence plej eblan perfektecon en socia organizo. Ĝi ankaŭ kompreneble celas, kiom eble plej altan konon pri ĉio ĉirkaŭanta la homon.

Tiu celo tiel klarigita ĝuste konfuzigis, iel detruis la materealismon, kaj ĝin konsiderigis kiel doktrino de dibočado kaj senlima ĝuado. Jes, bedaŭrinde oni forgesis, ke materialismo estas homkonforma proceso. Oni forgesis, ke materialismo, kiel proceso, ekiras de la spontaneaj agoj de la homo, oni neniigis la instinkton per malbona, arbitra uzado de racio, oni kreis la malbonon, ne sciante ke la instinkto neniam estas malbona, sed simple specikonforma. Tiun detruadon faris ĝuste spiritualismo, en sia socia manifesto.

Materialismo konsideras unue la spontaneajn, denaskajn, ecojn kaj kapablojn de la homa genro, (instinkto), kaj de tie elvolvigas la proceso de socia esploro, kiel natura funkcio, neniam ellasante tiun instinkton. Tiel materialismo nepre kapablas eviti degenerajn mutaciojn. Materialismo ankaŭ ne povas esti pura doktrino aŭ teorio, ĝi valoras nur kiel fenomeno de agado, manifesto, kiam ĝi ekestas spontanee, libere en la homo: tio estas for deviga akcepto de tezoj el edukado kaj instruado. Materialismo estas do esence individua kaj socia, (konforma al la homa harmoniigita karaktero: egoismo-sociemo). Ĝi estas la vera sintezo de la homa manifesto.

Spiritualismo:

Spiritualismo estas doktrinaro, (estas pli ol miloj da!) kiu sin bazas sur kredo, kie la spirito estas supera ol la materio. Spiritualismo prenas kiel fundamento, la ekziston de supera spirito ĉion reganta, kiu sin manifestas ĉe ni, tra nia propra spirito (menso), animo, etera korpo, ktp, kaj tiel nin estras kaj donas al ni scion. En spiritualismo, ĉio sentuma estas erariga, falseca, ĉio vera estas spirita. Ĝi eĉ asertas, ke kompreneble, la propra materio estas nura formo de la spirito.

La veran spiritan konon atingas la homo, ĉefe tra intuicio kaj intuo per la penso. En spiritualismo la penso ne estas pure mensa, intelekta funkcio, male ĝi estas la reala manifesto de la supera spirito en la homo, kaj kunportas la ideojn, ktp.

Kompreneble, ĉar la supera spirito, ĉion estranta, ĉion scianta estas eterna, ĉar la homo estas ankaŭ formo de la spirito, logikas ke la homo ankaŭ estu nemortebla: t. e., la homo forigas el materia formo, sed daŭre ekzistas kaj reenkarniĝas, aŭ, laŭ la doktrinoj ĝuas en la paradizo!

Ĉar tie-ĉi kaj nenie, tute ne eblas komplete klarigi tion kio estas spiritualismo, ni resumu: Spiritualismo estas doktrinaro esence mistika, mita kaj dogma, kie oni ludas, ĵonglas per vortoj (la fama LOGOS) kiel: spirito, animo, penso, vero, evangelio, biblio, vitala forto, kristo, triunuo, korpo etera kaj astra korpo, paradizo kaj reenkarniĝo, profeto kaj pastro, papo kaj mediumo, anĝelo kaj klarvidulo, intuicio kaj preĝo, mistero kaj magio, ktp, ktp. Por simpligi ankoraŭ pli tiun konfuzaĵon kie la spiritualistoj mem dronas, mi diru, ke spiritualismo estas la nekalkuleblaj variantoj de doktrinaro kie ĉio homa, kosma, socia, universa klariĝas, koniĝas, lumiĝas per la granda, vasta vorto: DIO.

Kompreneble la celo de spiritualismo estas grandioza: ĝi daŭre strebas konduki la homon al plej granda, perfekta harmonio kun la supera kreanto, reganto, nia Sinjoro Supera Spirito, Dio KTP, por ke fine la homo atingu la dian superecon mem.

Decas, ke ni tuj diru ke Dio (aŭ la Spirito, laŭ via propra ŝato) estas granda blagulo kaj satirusa farsulo, ĉar laŭ la sama spiritualismo, Dio kreis la homon perfektan... kiel sin mem! sed iam decidis "liberigi" la homon, kreante samtempe malbonajn logajn spiritetojn kaj aliajn serpentojn, por ĉikani, turmenti la homon, kaj por ke tiu-ĉi baraktu, lernu, memstariĝu...!

Spiritualisma Fonto:

Spiritualismo, iel aspektas konforma al certa karaktero psika, psikologia de la homa konduto. Sendube kiam la homo ne estis evoluinta, ĝis intelekta, racia kapablo, kiam la homo ne sciis starigi la demandon: KIAL?, spiritualismo, ne ekzistis ĉe la homa specio, same kiel la hundoj, erinacoj, najtingaloj, ezokoj aŭ majskaraboj ne pensas pri spiritoj kaj dioj, kaj ŝajnas, ke ili vivas same feliĉaj, se ne pli, ol la homoj, sed tio estas alia afero!

Spiritualismo estis do kreita de la pensanta homo por doni kontentigan respondon al tiu "kial", kiu aperas ĉiumomente, kaj kiu plej ofte restas en enigmo. Spiritualismo venis en la homan cerbon por solvi enigmojn nesolveblajn.

La homo nepre volis scii sian devenon, sian esencon kaj kiel oni konstruis la mondon, spiritualismo kontentigis ĝin!

La homo ĉiumomente timis kaj timas, sed rapide, ĝi kreis spiritualismon, la savtrabo al kiu ĝi sin alkroĉas. La homo ekzemple ne povas sen netolereblaj turmentoj kaj inkuboj akcepti, ke post sesdek jaroj da vivo, ĝi malaperu, estu nenio, mortu. Tiam la homoj tra spiritualismo majstre ŝtopis la abismon de l'morto!

Spiritualismo, en sia origino estas pura kaj simpla manifesto de la ĝeneraligita homa komplekso. Ĝi ne estas pensebla sen komplekso.

Plej trafa pruvo de tiu spiritualisma origino, estas la fakto ke, krom la homoj kiuj estas spiritualistoj pro intereso, tradicio aŭ mondana pozicio, ĉiuj aliaj estas neŭrozuloj kaj kompleksuloj kiuj serĉas konsolon... lumon ĉu ne!

(Sekvota)

La Milito, Tiu Agonia Ondo

Hodiaŭ, nia sentemo de evoluitaj estuloj, forigitaj de la ĉiutaga barbareco, kondamnas tiujn hommortigajn luktojn. Tamen la plej potenca argumento kontraŭ ili, ne estas, ne povas esti morala argumento. La moralo akceptas tro da antaŭjuĝoj. Ĝi daŭre cedas je tradiciaj pasioj. Memestimo, vanteco, falsa sento pri la valoro de la volo, de la energio, ĉiuj tiuj insidaj ecoj estas oftege uzitaj. Kaj la senkuraĝigita penso ektimas triste kaj ombre, kaj meditas pri la suprajeco de la homaĵoj, efemeraj kaj pereeblaj. Plie la uzo de arto, de beletro, de elokvenco por defendi interesaĉojn, igas tiujn rimedojn ege malŝatindaj, kaj malpurigas nian moralan personon.

Bedaŭrinde, la plej alta priokupo de la homo ne estas la libero nek la konscienco, sed la nutraĵoj kaj la seksaĵoj. La milito ekzaltas tiujn necesaĵojn, ĝi timiginde favoras la malstreĉado de la moroj. Sorel, jam sin demandis ĉu la mondo vere bezonas tiun liberon, akirita per tiom da gravaj sinoferoj. Eble la libero estos estinta nura fazo en la homara evoluo. La ideo pri libero rezultanta prefere, ne de raciaj sed de juraj priokupoj. "La amo kaj la malsato estras la mondon".: tio estas la epigrafo la plej vera, laŭ Gorki, ĝi estas tiu kiu plej taŭgas por la senfina historio de la homa ĝeno kaj sufero.

Jam Freud pensis ke la homaro ne estos diferenca de tio kio ĝi estis ĝis la nuna epoko. Ŝvebanta senĉese inter esperondoj ofte trompitaj kaj timoj kiuj estas veraj mankoj, kiuj ajn estu la okazantaj eventoj. Kaj tamen "non de solo pane vivit homo" (Ne nur per pano vivas la homo). La homo ne povas vivi sen alta celo, sen sopiro nekontentigita kiu estas la aŭroro de la morgaŭa espero, kvankam, la bagateleco kaj la malkvieteco plene okupas la ĉi-tempan spiriton.

Unu nura argumento valoras, la argumento de la biologio, la vitala absurdo de la militoj, la grava perturbo kiun ili okazigas je la aparta ekvilibro de la nacioj kaj je la ĝenerala ekvilibro de la homa socio. La milito metas siajn negativajn fortojn kontraŭ tio kio sanigas kaj ekvilibrigas la sociojn: kontraŭ la justico kiu ne konas senkulpulojn, kontraŭ la juro skuita en ĝiaj fundamentoj kiuj kodigas la plej malbonajn senkonsekvencaĵojn, kontraŭ la libero kiun oni katenas kaj sen kiu, fizika aŭ spirita, la tuta organismo rustiĝas. Tio estas la ideo de tio kion oni nomas hiperbola milito, rimarkas Alain, de la milito kiu ne kalkulas nek la mortintojn nek la ruinojn, kiu formas kaj reformas siajn armeojn per tuta popolo kaj kiu eĉ ne demandas al si: "Kio okazus se ni perdus?." Kaj estas ekzakte tiel ke ludas la frenezaj ludantoj. Ĉu la certeco pri fiasko kaj tuja puno ne malhelpus ĉiujn krimojn? La milito devus nin korpremegi per hontegoj kaj bedaŭroj, rememorigante al ni la kompatindajn bezonojn de nia naturo kaj de nia homa krueleco.

Tiu milita trouzo estas la plej malaminda, tiel ke ni devas kredi, aludas Anatole France, ĉu la popoloj iĝas pli kaj pli agresivaj per la progreso de la artoj, ĉu la milito estas necesaĵo de la homa naturo; oni ankoraŭ militas por militi kiam oni ne plu havas motivojn por militi. Estas do per la kreskanta armilara grando, ke oni vantas antaŭvidi malproksimegan universalan pacon. Post la detruo de ĉiuj falsaj principoj, la socio postvivos ĉar ĝi estas fondita sur la neceso kies leĝoj pli malnovaj ol Saturno, ankoraŭ regos kiam Prometeo estos eltroniginta Jupiteron. Se la pasioj kontraŭigas regantojn kaj regatojn, estas nepra, ke la ribeloj, la militoj, la nerespekto aŭ perforto de la leĝoj estas imputeblaj malpli al la malico de la individuoj ol al la malbona organizo de la registaro. La konceptoj de Spinoza, konservas ĉiam malgraŭ la tempo sian tutan valoron. Ĉar ĉiuj detaloj de la socia strukturo estas bazitaj pli sur utileco kiu plej ofte estas nur ŝajna kaj ilu-zia, estas tre malfacile, precize elmontri tion kio reale konvenas por la homoj. Rezultas ke nur la penso kapablas liberigi la korpon kaj ĝin redoni al la Universo, kiu estas nia vera patrio. Unue prediki pri la vivo, ne pri la morto, disĵeti la esperon, ne la timon, kulturi la ĝojon, Ĉar la senkuraĝiĝo elĉerpas la mondon, la regno de la maljusteco ebliĝis. Kiu ajn estu la medittemo de la homo, ĝi oftege pensas pri la morto. Tiel estas ĉe la plejparto de la intelektualuloj. Nu, klare parolante, kiu vero povas ekzisti se estas morto, nur morto? La malamo, la krueleco, la akraj pasioj, la detruaj militoj, kie ili partoprenas por la vero? Se ne por tiu vero, kiun ili emas envolvi en morala hororabismo.

Per ĉiu plago la homoj senkuraĝige konstatas kiom ili estas disigitaj kaj katenitaj en terura divido kaj elĉerpiga soleco. Se la milito eblas, tio estas ĉar la homo ne volas kompreni, kaj ĉar ĝi atribuas al ĉio stampon de neevitebla fataleco. La ignoro akceptas ĉiun fatalecon. La agovolo povus savi la homon kaj la homaron.

La milito ne estante necesa manko, ankoraŭ malpli nobla ludo aŭ lernejo por altaj virtoj, el la ŝtormo kiu detruas kaj kruele sieĝas la mondon, ĉu ni ne devus vidi ŝpruci la racian sparkon anoncanta la novajn tempojn?

Ĉu krei tiun medion fovoran al la dinamika ideo de homaranismo kaj kooperado, ne estus la plej sublima celo de tiuj sindonemaj kaj universalaj pensoj kiuj reale formas la veran vivklimaton por la hodiaŭa "civilizita" homo, tiu homo kiu amas la veron kaj la agon por la justico super ĉio?

HERSCOVICI

Reĝimo plene malhoma kiel estas nia, ne nur ne edukas estulojn, kapablaj konstrui homan socion, sed modlas laŭ sia propra aspekto ĉiujn, kiuj submetiĝas, tiel regatoj kiel regantoj.

Simone Weil

La Homo en la Moderna Civilizo

La moderna civilizo estas por la homo, sensenca:

La vorto "civilizo" estas ofte uzita por indiki la diversajn manierojn de elvolviĝo intelekta, morala kaj industria de la socio. Tie-ĉi ni komprenu la vorton "civilizo", kiel industria elvolviĝo. Por la intelekta kaj morala ni uzu la vorton: kulturo.

La moderna civilizo estas karakterizita per granda elvolviĝo de maŝinismo, kiu komenciĝis kiam oni konstruis la unuan vapormaŝinon. La laborilmaŝinoj poste aperis en la uzinoj kaj metiejoj; homoj kun ili eklaboris: estis la unua stadio de la teknikeca revolucio. Resume, la homo — kreinto de la maŝino — iĝis ĝia servanto, kun t a s k o "bone labori"; kaj bone labori signifas labori laŭ la maŝina kadenco, kiel alia maŝino.

Kaj, kiam la maŝino anstataŭis la homon, kaj tiel forigas ĝian perlaboron, nova fakto aperas: la homo ne estas plu la sklavo de la maŝino, ĝi fariĝas la viktimo.

Kio okazas kun la homo en la moderna civilizo? Ĝi estas forgesita: Kio valoras, estas la kostoprezo kaj la vendoprezo; estas la pliriĉiĝo, la akumulado de mono, dank'al produktado intensa. Fakte la moderna ekonomio, kiu estas la armaturo de la civilizo, posedas la monon kiel bazo, la riĉiĝon kiel celo, kaj la produktadon kiel rimedo.

Tiu komerca ekonomio ne celas servi la homon, sed uzas ĝin por postvivi, forĵetante ĝin kiom eble plej. Rezultas la ekonomio mortiga kaj krima kie ni vivas, kaj kie ni estas nuraj rimedoj de tiu malhoma, mallogika sistemo.

Malnobligo de la homo en la moderna ekonomio:

"Tie, kie ne eblas meti maŝinojn, oni metas homojn. La homoj estas tiam la akcesoraĵo de la aŭtomataĵoj", s k r i b i s G. Friedmann. La laboro p e r d i s sian primitivan celon, kiu estis produkti por la homa konsumado, kaj la laboristo perdis la senton, ke ĝia laboro havas socian utilecon. La laboro estas nura rimedo havigi al si monon; kaj la laboristo estas atentinda por la dunganto, nur kiam tiu-ĉi povas profiti el ĝia laboro. Homo povas vivi nur, se alia homo iel profitas el la vivo de tiu homo, diras J. Duboin. La homo perdis do sian propran valoron en tiu civilizo kiu malkonas fratecon.

Ne povante vivi sen mono, la homo devas "lukti por gajni sian vivon"; la motivo de tiu lukto kontraŭ siaj proksimuloj, kontraŭ aliaj homoj, estas nenio alia ol sia propra ekzisto! En la moderna socio, neniu atakas neniun... sed ĉiuj sin defendas.

Al la teknika, moderna mondo, korespondas la moderna homo; la homo-aĵo je la servo de la aĵoj; la sklavo kaj la viktimo de siaj kreaĵoj; la homo kiu bezonas similulon, nur kondiĉe ke ĝi profitu el ĝi; la homo-roboto, la civilizita homo, kelkfoje instruita, sed sen funda kulturo; la homo luktanta kontraŭ ĉiuj, kaj restanta malgraŭ ĉio en izolo... sen ligoj, nek kun la laboro, nek kun sia medio, nek kun la socio: la homo soleca...

EDUKO DE LA ROBOTOJ:

La moderna civilizo edukas siajn servistojn konforme al siaj bezonoj. Oni postulas nur rapidan ekzercadon, kie ĉiu laboristo-roboto lernas p l e n u m i la agojn, gestojn, antaŭviditaj de la maŝinkonstruistoj: la laboro estas monotona, simpla kaj enuiga. Tiel, milionoj da homoj vivas, po almenaŭ ok horoj tage, ses tagoj semajne, sub leĝo multege pli rigora ol tiu, kiun trudus la plej akra diktaturo, sub la leĝo de la scienca organizo de la laboro, inspirita per la senfina klopodo por la plej granda efika profito.

Ĉe la elito de la robotoj, la mankoj de la civilizo estas ankoraŭ multe pli katastrofaj. La teknika progreso postulas edukon pli kaj pli gravan, kiun oni akiras per studoj pli kaj pli malfacilaj: tiel formiĝas robotoj tre instruitaj, kun grandaj kapablecoj en "certa direkto"; tia elitulo, ne elvolviĝas harmonie laŭ intelekto, moralo, spirito, sed nur laŭ la teknikaj kapablecoj, necesaj por la plenumo de la eventualaj funkcioj en la ekonomio. Tia roboto konas, nur tra la formuloj kiujn siaj profesoroj, mastroj liveris samtempe kun la diplomoj. Tiu elito posedas konojn pli kaj pli fundajn pri la naturo, ĝiaj leĝoj, sed mankas la konscienco, t. e. la interna sento per kiu la homo mem konscias pri la bono kaj malbono kiun ĝi faras: enfermita en la scienco, la teknikista elito estas sensocieca, senhomeca, kiel la civilizo kiu ĝin formis, kaj de kiu, fidela kaj blinda servisto ĝi estas. For nia fako ni estas ĉiuj primitivuloj.

Estas malfacile, tre malfacile resti homo, en la teknikeca civilizo: la civilizo mortigas la kulturon.

A. DMITRY

(El "La Grande Relève")

NR: Nia celo, la celo de tiu modesta "La Objektivo", estas eviti tiun mortigon de la kulturo, por ke ni restu homoj, kaj perfektiĝu kiel homoj, en vere bonfara civilizo.

Por eviti e v e n t u a l a j n miskomprenojn, ni aldonu, ke nek la aŭtoro de la artikolo, nek ni, estas malfavoraj al maŝinismo, tute male, la maŝino, racie uzita en racia ekonomio, estas la vera kreanto de abundo, de orepoko!

Pri filozofio... Kaj cirko

Nia kara Plena Vortaro, donas la jenan difinon pri filozofio: "Scienco pri la esencaj plej ĝeneralaj principoj kaj kaŭzoj de la estado."

Tio estas tute gracila, plaĉa difino ĉu ne? Tiom alloga ĝi estas, ke la homoj ne ĉesas plu vadi kaj droni en ĝi. Ne gravas, la homoj volas koni la kaŭzojn, la esencajn principojn pri ĉio kaj de ĉio... tial ili fi-lo-zo-fas, devas fi-lo-zo-fi... aŭ -zo-fi-i! Kaj la antikvuloj kiuj nur diris: "Primum vivere deinde philosophari," estas la kaŭzo, kiu kaŭzis, ke ni ne konis nian kaŭzon, tial nun la moto estas: "Unue filozofi kaj poste vivi." Rezultato? Estas tiom da filozofioj, ke ĉiu havas sian propran. Tiu kiu ne havas sian, nu, li kuru en la plej proksiman librejon, kaj elektu, en kiu ajn angulo li trovos dek variantojn de ĉiu, en poŝformato, binditaj aŭ silkpaperaj. Kompreneble, kiu ne interesiĝas pri legado, aŭ ne havas monon por aŭ pro, ne senkuraĝiĝu! Necesas nur eniri: Templon, Kirkon, Loĝion, Moskeon, Katedralon, Kapelon, aŭ Fakultaton pri, finfine iun ajn spektaklejon aŭ lernejon tian, kaj vi ricevos la porcion de filozofio kiun vi deziras, tute senpage... Decas, ke vi tamen donu groŝon al la unukrurulo kiu filozofos ĉe la sojlo! Mi eĉ konsilos al vi, ke vi ne forkuru tuj, sed vi iom sidadu sur la humida, frosta ŝtuparo, tute apud la unuokula senkrurulo por kungustumi ruban, ŝimitan panpeceton. Tiam nepre via amiko rakontos al vi sian filozofion: pri la kaŭzo de..., kio sendube vin helpos iom en la komprenado de la ĝenerala kaŭzo! Se ne helpas, nu! revenu al la klasikuloj de la temploj, ĉar fakte ili konas la kaŭzon.

Mi tuj devas malkaŝi, ke la PV-difino estas ege arkaika, ĉar nun post pli ol 2000 jaroj da filozofiado, ĉiu junulo, kiu jam parkerigis alfabeton, kaj noble frekventas majestan edukejon-instruejon, kaj tiel ĵus saturigis sian kompatindan cerbeton per ekzemple la mil aŭ du mil paĝetoj de la "Kurso pri Filozofio" de iu G. Lahr, scias, ke filozofio estas: "La scienco de la animo, de la mondo, de dio kaj ĝiaj rilatoj."

Almenaŭ nun jes, la difino estas substanca. Ne temas plu pri kaŭzoj, sed realaj faktoj: animo, spirito, Dio! Kaj ĉio tute scienca: t. e. laŭ PV.: "Ekzakte, precize kaj metode konata", tra la fako kiel: psikologio (scienco pri spirito kaj ĝiaj fenomenoj), logiko (leĝo de rezonado), ontologio (scienco pri esto kaj ĝiaj kaŭzoj...), kosmologio (scienco pri leĝoj regantaj la universon), teologio (scienco pri dio), ktp, kaj multe pli!

Pardonu min, kara leganto, se tio jam fariĝas granda galimatio, kaj se vi nenion plu komprenas. Pri tio vi ne kulpas, ankaŭ mi ne, ĉar ĝis nun neniu vere ĉi-tion komprenis. Vi do ne miros, kaj tute akceptos kun mi la tre saĝan difinon, kiun iam donis al mi sagaca profesoro pri filozofio mem: "Filozofio estas la scienco de la azenoj." Mi nur bedaŭras en tiu difino, ke oni tiel akre mistraktas tiun povra animalon, kiu absolute ne meritis tion. Kaj, ĉar azeno, tie signifas: kreteno, stultulo, estus multe pli logike uzi la vorton "homo" anstataŭ "azeno", en la difino. Tiel ni havus: "Filozofio estas la scienco de la homoj."

Ĉu vi ne rimarkas, kun kiu aŭdaco kaj supleco, mi manipulas la vortojn: homo azeno, stultulo kaj kreteno? Nu, tio estas filozofi, tute simple. Vi atentu bone, ke en la realo, ĉiuj tiuj logioj, (ekzaktaj, precizaj konoj) estiĝas en la homa kapo, en tiu griza materio kiun oni nomas: cerbo, kiu mem estas zorge, rigle fermita en tiu skatolo, kiun oni nomas kranio. Plie, neniu ignoras, ke tra tiuj kraniaj parioj konverĝas, difuzas, radias multaj aferoj, pri kiuj ni ne parolos hodiaŭ. Ni nur rememoru, ke unu el tiuj radiaĵoj estas la ideo: "Abstrakta koncepto de la spirito pri objektoj aŭ ecoj", instruas P-V. Kaj, kvazaŭ unuanime, la filozofoj akordiĝas por diri, ke tiu ideo, estas la reala materio kiu konsistigas filozofion. La scienco en filozofio, evidentiĝas per la ideoj. Kaj kompreneble, la ideoj mem materialiĝas per... vortoj. Je tiu punkto, mi do prezentos al vi mian propran difinon pri filozofio, ĝi ne estas pli transcenda ol la aliaj, sed almenaŭ tiom pitoreska kaj reala: "Filozofio estas cerba akrobatado, kie oni ĵonglas per vortoj."

Sendube vi jam, almenaŭ unu fojon en via vivo, iris en cirkon, almenaŭ unu fojon vidis ĵongliston. Do reprezentu al vi tiun cirkon, kaj samtempe pensu pri filozofio. Jen: la ĵongliston estas la filozofo, la pilkoj estas la vortoj. La akrobato ĵetas la pilkojn, rapide, rapidege, bele; figuroj formiĝas, kurboj dancas, saltas, ŝprucas kvazaŭ fajreroj... subite, ĉio ĉesas, la belaj figuroj kiuj desegniĝis en la spaco malaperis, restas nur la ĵonglisto kaj apude, inertaj, la pilkoj!... sed via propra kapo ankoraŭ turniĝas. Bone, nun, rekonstruu la spektaklon, kun la filozofo kaj la vortoj, kaj vi ekzakte same ĝuos: samaj arabeskoj, samaj dancadoj kun ŝprucado kaj sparkado... kaj finfine nenio plu, nur terura kapdoloro. Por ne havi krimon en mia konscienco, mi avertas tiujn kiuj eventuale provos la filozofiadon, pri la grandaj zorgoj plenumendaj, ĉar tia kapdoloro, tre facile povas degeneri en eternan obsedon, histerion aŭ frenezon!

Tiuj kiuj neniam iris en cirkon, ne senkuraĝiĝu, ili nur supozu teknikiston (la filozofo), kiu per pecoj el fero, ŝtalo, ligno, vitro, ktp (la vortoj) decidus konstrui maŝinon kiu demonstrus ĉiujn fizikajn leĝojn, uzitaj en la teknikoj (la filozofio) sed kiu ne havus praktikan utilon... Absurda afero ĉu ne, Ho ve, tiel estas.

Ni sufiĉe sciiĝis pri la difinoj de filozofio, estus bone se ni iom vidus, la praktikadon ĉu ne? Ni ekzemple enprofundiĝu en la sekreton pri konstruo de la diversaj doktrinoj filozofiaj. (Atentu ke temas pri ĵonglado!) Ni ĵonglu ekzemple per la vortoj: Dio, animo, spirito, triunuo, moralo, amo, ktp, tiam ni havas

(Sekvo paĝo 6)

(Sekvo de la paĝo 5)

ĝeneralan spiritualisman filozofion. Sed, se ni volas apartan filozofion, ni devas, laŭ la sekto elektita, aldoni vortojn kiel: biblio, papo, mediumo, klarvido, etero, ktp.

Se vi preferas esti, kiel oni popole diras: materialisto, marksisto k. s., tiam vi ĵonglu per: tezo-antitezo, kaj faru la sintezon. Se vi aldonas unu bildon, kaj kelkajn vortojn kiel proleta diktaturo, klasbatalo, tiam vi iĝos komunisto, aŭ simila.

Se vi skribas la vortojn: esenco-ekzisto, kaj se inter ili vi aldonas: mi fekas do mi eksistas, mi bordelumas do mi ekzistas, ktp, kaj ripetas, tiam vi estos ekzistadisto.

Metu la vorton NE, antaŭ aŭ post, ĉiun vorton kaj ĉe ĉiuj, kiujn vi jam skribis kaj vi iĝos nihilisto.

Kunmetu iujn ajn vortojn, iel ajn kaj oni taksos vin kiel surrealisto, KTP, KTP;

Kompreneble, mi tie-ĉi ne povas tre bone klarigi la aferon, vi devas mem praktiki, multe praktiki, ĉar kiel diras la fama Proverbo, kiun vi bone konas: Nur ĵonglante oni fariĝas filozofo. Kaj, ju pli komplikaj, longaj estos la vortoj, ju pli vi enmetos grekajn, latinajn, ĉinajn vortojn, des pli ŝatinda, altnivela estos via filozofio. Sendube ĉiuj volus ekzemplon de tia altnivela filozofiaĵo? Nu, mi citu al vi la artan verkon kiun mi laste metis sub miaj okuloj.

Estas ĵonglaĵo de Vladimir Jankelevitch, profesoro en la beletra fakultato de Parizo. La titolo estas: "L'Austérité et la Vie Morale" (Mi ne esperantigos tiun titolon ĉar tio malaltniveligus la aspekton!) Se vi estas sufiĉe kuraĝa por tranĉmalfermi la paĝojn, vi konstatos, ke tiu libro plej parte estas en la franca lingvo, kun pli ol du cent paĝoj dense skribitaj. Se vi pli atente rigardas, vi konstatas, ke krom la multnombraj filozofiaj vortoj, tute francaj, kiujn vi tute ne komprenas, estas pli ol dekkvin vortoj en la grekaj lingvo kaj alfabeto, en ĉiu paĝo, sen paroli pri la latinaj, anglaj kaj germanaj citaĵoj. Jen por ke vi komprenu la valoron de tiu verko, kelkaj ekstraktitaj titoloj de ĉapitroj:

I-a ĉapitro: Penta sinofero kaj dekadenco: 1) La dekadenca teratogonio: monstroj de la konscio de konscienco. 2) Monstroj de la ekstremismo: gigantojnanoj. 3) Kapo sen korpo, korpo sen kapo. ktp. 7) La progreso estas dekadenco, la dekadenco estas progreso... ktp ĝis la fino. Bela akrobataĵo ĉu? kaj tio estas nur titoletoj de la majstraĵo. Resume, en la tuta libro oni ĵonglas por pruvi, ke la sinofero pro pento estas ege grava, sed, io iom ne kutima en tiuj artaĵoj: ĝuste kiam oni pretis ĉion akcepti kaj aprobi pro tedo aŭ obsedo, jen, la libro komplete memnuliĝas: "Cetere, diras la aŭtoro, la sinofero pro pento, ne estas tiom grava. Fakte, ni ankoraŭ ne diris la precipan aferon, sen kiu ĉio estus perdita tempo..." Sekvas kelkaj pliaj vortoj, kaj subite aperas nova vorto: "Amo", kaj ĉio finiĝas kiel ĉe lerta ĵonglisto, kiu ĵonglinte, per blankaj pilkoj, subite finas komplikan figuron per ruĝa pilko!...

Imagu, ke antaŭ kelke da tempo mi estis sufiĉe kuraĝa por aŭdi vortĵongliston dum pli ol tridek horoj (tamen ne sinsekve.), mi do ĝojus transdoni al vi la esencon de tio, kion mi lernis en tiu ĵonglado, kio cetere tre bone ilustros ĉi-tiun artikolon. Ne timu, mi ne tedos vin dum tridek horoj!

Temas pri antropozofia ĵonglado. Ĉar "antropo" signifas homo, antropozofio estas do la scienco de la homo. Vidu tiurilate la pli supran difinon de mia iama profesoro! Atentu, tiuj, kiuj estas jam lacaj, ĉesu la legadon. Tiuj, kiuj plu legos, bonvolu verifiki ĉu la seĝo kie ili sidas, estas firma, ĉu la tablo estaş bone fiksita kaj preta por rezisti al ĉiuj eventualaj streĉiĝoj. Kiuj ankoraŭ staras, tiuj sidu aŭ iru apud muro. Estus ankaŭ prudente, ke tiuj, kiuj ne abstinas nek vegetaras, aranĝu por si bonan glaseton da arako aŭ konjako, por eventuala stimulado!

Ek al ĵongl'!

"Temas pri la kono de la reala realo.

Ekzistas du mondoj: la spirita kaj la materia. (Ĉiu akceptu tion, por ne komplikigi!) Ili estas tre diferencaj unu de la alia. Ekzemple la kono, en la materia, sentuma mondo, evidentiĝas laŭ la proceso: apero-penso-scio. En la spirita mondo la proceso estas: Penso-scio-apero. Sekve en la materia mondo la realo estas erarebla, en la spirita ne, ĉar ĝi estas unue pensita. Se la penso-scio-apero de unu el la mondoj, koincidus kun la apero-penso-scio de la alia mondo, tiam ni havus la realan realon.

Per aliaj vortoj, en la materia mondo ni konas iun realon laŭ la jena vojo: Percepto-fenomeno-prezentado-proceso-regulo-leĝo-abstrakta koncepto. En la spirita mondo, ni iras de la spirita koncepto (la spirita koncepto estas ankaŭ la konkreta koncepto ĉar ĝi estas kaŭzo), al la spirita fenomeno. Se la konkreta koncepto koincidas, kongruas kun la abstrakta koncepto, kaj se la spirita fenomeno ankaŭ kongruas kun la materia fenomeno, tiam ni havas unu nuran fenomenon, kiu estas la reala realo.

Kompreneble, granda obstaklo, por ke tiu kongruo okazu, estas la abstrakta koncepto en la nedorma menso. La abstrakta koncepto kvazaŭ ŝtopas la nedorman menson, kaj malebligas ĉiujn pliajn evoluojn. Tial. por akiri realan realon, necesas abstrakti la abstraktan koncepton, de la materia mondo, per la inversa proceso: abstrakta koncepto-regulo-proceso-prezentado-fenomeno-percepto. Tiu abstraktado de la abstrakta koncepto estas la intuo: vera fonto de la reala kono.

Alia nepra kondiĉo por la kongruado de la du mondoj estas la malplenigo de la menso, tiel ke la spirita koncepto en la spirita mondo, plene kongruu kun la formo de la malplenigita menso. Je tiu kongruo aperas el la spirita mondo la spirita fenomeno, sekve la reala realo, kiel realo spirita kaj materia. Necesas do liberigi, malplenigi la menson."

Huf!... finiĝis, mi liveris al vi la tutan sekreton por ke vi povu koni la realan realon, (ĉar ekzistas falsaj realoj!), mi liveris al vi la tutan sekreton, por ke vi fariĝu spiritualisto kaj filozofo... Nun, elektu vian vojon, faru konscie vian devon ĵonglu, filozofu.

Sendube, kiel mi post la streĉa aŭskultado, vi ne estas plene

(Sekvo paĝo 7)

El Niaj Legantoj

Estas tre ĝojige vidi, ke kelkaj el niaj legantoj, interesiĝas vere pri nia afero, kaj speciale pri la iro de "La Objektivo". Ĝis nun ni ricevis nur kuraĝigajn rimarkojn, kun eĉ tro da laŭdoj... ni preferus ankoraŭ pli da kunlaboro, pli da helpo!

Du amikoj opiniis, ke ofte la artikoloj estas iom longaj. Tio estas vero, sed prezenti amplekajn temojn en mallongaj artikoloj, tiel ke ĉiuj perfekte komprenu la ideojn de la aŭtoro, ne estas tre facila tasko, kaj ni ne povas pensi pri bildĵurnalo!

Kamarado Polo, faris tre interesajn observojn. Li opinias, ke en la esprimoj: "vera socialismo", de la gvidrezolucio, kaj en la artikolo: "Legu kaj opiniu, libera komunismo", (L. O. n.º 2), la vortoj: "vera kaj libera" estas superfluaj. Li aldonas:" Verŝajne oni povas diri, ke en diversaj landoj, kie estas konstruata, aŭ se vi volas, kie regas socialismo aŭ komunismo, ne ĉio estas en bona ordo, kaj certe pro tio oni povas supozi, ke tie ne estas vera socialismo, aŭ libera komunismo. Mi opinias, ke oni ne devas paroli, kvankam io ne estas bone konstruata, pri malbona konstruado, ĉar plej ofte la konstruantoj estas malbonaj. La efiko de konstruado dependas antaŭ ĉio, de konstruantoj."

Jes, estas la kazo, de la konstruantoj dependas la konstruado kaj la konstruaĵo. Se la konstruantoj, en la plenumado, iel devojiĝas de la unua celo, eĉ se ili konservas la nomojn, la verko ne plu korespondas al la ideo. Tial la vortoj: "libera kaj vera", nur venas por redoni korektan signifon al vortoj, kiuj praktike, bedaŭrinde ne reprezentas la unuan ideon...

Kamarado Polo, ankaŭ strangiĝas, ke en la gvidrezolucio estas: "... for de la diaj fikcioj", dum en la artikolo "De l'genezo de la idealismo..." oni diras: "Tial, ne atendu de mi, ke mi skribu: dio estas tio, aŭ, dio ne ekzistas...". Jes, la fakto ke ni devas liberiĝi de diaĵoj, ne implicas, ke oni neniam pri tio parolu. Ŝajnas ke la malo pravas: ni devas neŭtrale, bone konsideri la ideon laŭ ĉiuj flankoj, kaj poste, komplete liberiĝi, aŭ plene ĝin akcepti; ni nepre devas eviti dogman unuflankecon. Eĉ naivega konsidero, estas pli bona ol fermado de okuloj, aŭ legado de eterna biblio. Certe k-do Polo: "la pensado havas brilan estontecon", sed la malbrila estinteco ankaŭ venis de la pensado!

Pri la artikolo "Legu kaj opiniu", oni prave rimarkas, ke la punkto: "fruktvegetara nutrado" estas tute akcesora afero, rilate aliaj punktoj. Tio estas vero, kaj la redakcio ankaŭ opinias tiel, ĝi tamen estas grava, ĉar ĝi tuj enkadrigas la ĝeneralan, ĉiutagan aktivecon precipe ekonomian.

La fakto, ke estas libereco de penso, ago, ktp, kaj ankaŭ sennaciismo, senreligiismo, aspektas tute kontraŭdira. Reale ne estas, ĉar oni bone povas vivi tute libere en penso kaj ago, eĉ tutkore voki, preĝi al dio, kaj ne havi eblecon formi religion, ismon kiu socie influus la individuan liberecon. Ja ismo estas esence dogma, do en nia kolonio ni antaŭvidu senismecon. Kompreneble estas malfacile enkadrigi tiujn konceptojn en nia nuna pensmaniero, estas kiel se ni parolus pri atomenergio al kavernulo!

Nia kamarado, donas kiel pozitiva, konstrua opinio pri la kreado de tiu kolonio, la jenon.

El la starigita programo oni devas forstreki: frukt-vegetara nutrado, kaj anstataŭ: konsekvencaj - sennaciismo, senreligiismo, senpolitikeco, ktp, doni la punkton: "konstanta propagando libera de: sennaciismo, senreligiismo, senpolitikeco ktp," ĝis kiam ĉiuj homoj kunvivantaj komprenos bonecon kaj liberecon el tiaj pensmanieroj."

(Sekvo de la paĝo 6)

kontenta, vi emus demandi: "Sed tamen praktike, kiel malplenigi la menson?" Malplenigi siajn poŝojn, sian monujon, sian vezikon oni tre facile povas, sed la menson...! Trankviliĝu, mi havas la ŝlosilon, la sama akrobato, donis ĝin al mi, jubile, spontane, kiel gurdo kun novstreĉita risorto: "Nu, la praktika metodo, estas legi de dudekkvin ĝis tridek fojoj, du aŭ tri broŝuretojn."

Mi vetas, ke neniu leganto pensis, ke estis tiel simpla afero, malplenigi la menson. Sed nun, certe neniu dubas pri la efiko de la metodo. Nu jes, rememoru la eternan brevieron de la pastro, pensu nur pri tiuj kiuj havas eterne biblion en la poŝo, kiuj lernadas daŭre: "La Kapitalo-n" aŭ aliajn "Mein Kampf", ĉu ili ne havas malplenan menson, kaj finfine obsediĝas kaj memmistifikas sin, kiel puraj filozofoj?

Pardonu min, se mi perdigis al vi tiom da tempo en afero, kiu vere ne meritus tiom da atento... Verdire, perdi tempon tie, aŭ en alia cirko, ne tre gravas.

LEDON

ATENTU

Ĉion pri "La Objektivo" vi sendu al la nova adreso:

Avenida Pátria 1377 apt. 2

Pôrto Alegre - R.G.S.

BRAZILIO

Radiotelegrafiisto, filatelisto, deziras korespondi anglalingve, skribu al S-ro Tratapel Marcel; 15 rue Labat, Paris 18, Francio.

Ne forgesu, ke niaj anoncetoj estas senpagaj!

Ni komunikas ke la abonkondiĉoj estas: ses numeroj por $70,00 brazilaj kruzejroj, aŭ $1,00 US dolaro, aŭ 10 respondkuponoj.

Kiu revis pri ideala alfabeto, tiu unûe rigardo INTERSTENON; kiu bezonas rapide skribi, tiu unue provu INTERSTENON.

La liberigita homo, la normala homo estas tiu kiu kontentigas siajn instinktojn sen komplikaĵoj, sen vanaj bedaŭroj.

K. de Mongeot

NIA SITUACIO

Ĝis nun nia financa flanko ne brilas kaj nia deficito ĉiam kreskas. Nur la presado kaj sendado de ĉiu numero kostas proksimume $ 4.000,00 kruzejrojn, kalkulu mem la ĝisnunan elspezon... kaj kunlaboru proporcie!

Ni kvitancas kaj dankas

Esp. Societo de Porto-Alegre $ 50,00; Ary Zamora $ 50,00; Lauro João Costa $ 200,00; K. Siedlecki $ 60,00; J. Dorn $ 70,00 (10 Rk); Kotro $ 70,00 ($ 1,00 US); Daglio $ 70,00 (10 Rk); G. Ferraz $ 14,00 (2 Rk); SUME: $ 584,00, kun antaŭa listo: $ 784,00.

Perantoj

Kun plezuro ni akceptis la spontanean oferemon de kelkaj kamaradoj por peranteco:

Argentinio: k-do E. H. Garotte, ĉe Bosso; Alsina 1947; Buenos Aires.

Italio: k-do C. Daglio; Litta Parodi; Alessandria.

Israelio: K-do J. Dorn ĉe Landaŭ, Zvi Bruck Str 3. Tel-Aviv.

Polio: K-do Jerzy Mazys; Wiktorska Nr 83/87-33; Warszawa 12.

Venezuelio: K-do L. Moulines, Apartado del Este 4845; Caracas.

Kulturigo per la Almanako de La Penso

(Traduko el propagandflugfolio pri la plej legata (preskaŭ sola) almanako de Brazilio... Sen komentarioj.)

Estu antaŭvidema! Akiru... la almanakon de "La Penso". eldono de 1957, entenanta: varian astrologian sekcion, seneraran indikon pri la tagoj bonaj kaj malbonaj por certaj iniciativoj, influojn de la nova luno en nia ĉiutaga vivo, konsilojn pri agrikulturo, varajn merkatojn, kambiajn variojn, horoskopojn de ĉiu el ĝiaj legantoj, fabelojn, anekdotojn, ŝaradojn kaj aliajn kuriozajn temojn utilaj kaj gravaj.

Oportunaj klarigoj

a) La almanako de "La Penso" estas eldonata ekde la jaro 1913-a seninterrompe, estante, en la speco la plej antikva publikaĵo de Brazilio.

b) Ĝia enhavo estas plene ŝatata de la publiko pro ĝiaj fakaj sekcioj, variaj kaj logaj.

c) La distribuado de la almanako de "La Penso" en la nuna jaro estis 520.212 ekzempleroj, kalkulitaj, estante tiel la publikaĵo kun plej granda eldonkvanto en Sudameriko!

VEKIĜU!

Tial ke ni estas laboristoj, kompreneble, ĉiuj ni celas alian socion, bazita sur fundamentoj tute liberaj kaj pli homaj ol tiuj de nia ĥaosa kaj fiera civilizo, ni devas klopodi la fratecon fortan kaj sinceran inter la tutmonda laboristaro.

Ĉar por liberigi nin el la kapitalista sklaveco ni nur povas trafi tion per nia propra agado nia tasko ne devas havi nacian limon, sed estu ĝi internacia.

Nur kiam la UNIVERSALA LABORISTARO konscios kaj luktos ĝis morti por siaj rajtoj, tiam ni vidos la brilan tagiĝon, kiu faros el la mondo veran homaran paradizon, kie la komenco kaj la fino de ĉiuj interrilatoj estos la AMO.

Kvankam nia objektivo esta unika kaj sama, staras inter ni grava baro, kiu malfacilegas nian venkon: la lingvoj.

Kompreneble, la laboristsociaj rilatoj ĉiam estas kunigitaj per delegitoj, kiuj vojaĝas tra la landoj alportante la decidojn de siaj reprezentitoj. Tamen tio ne sufiĉas; laboristo devas interrilati persone kun siaj klasaj gefratoj eksterlandaj. Tiu estos la plej nepra maniero por realigi la fratecon, kiu neprokraste naskos la veran Familion tutmondan.

Do ĉiuj laboristaj Asocioj devas iniciati propagandon, ĉe la naciaj laboristaj ĵurnaloj, fortan kaj necesan pri la konveneco uzi Esperanto-n por niaj internaciaj rilatoj klasaj. Kaj ĉiu el ni, esperantistoj, devas iĝi gvidanto por helpi niajn gefratojn paroli kaj skribi kiel eble plej baldaŭ tiun lingvon, kiu estas netaksebla rimedo por nia celo.

Do, k-doj, amikoj k s-anoj, komencu ni la taskon, kaj ĈIAM ANTAŬEN!

OASIS LAKAMBRA

K-do Ledon: Bonvolu trovi ĉi tie 2 respondkuponojn. Se vi kredas konvenebla tiu ĉi artikoleto publiku ĝin ĉe via ĵurnalo. Mi dankas vin la monatan numeron.

Sennaciece via

Gladio